

## & Fabelo:

< Rekante 24 el 47 batoj por strofo, entute 235 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923) kun noto "Muziko de A. Gurilev". Baladigis Martin Strid (2017) per partoj de polka-mazuria melodio de Aleksandro Gurilev kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:47 > (/mifa mi re doTi La Ti; MiFa Mi Ti LaTi do; mifa mi re doTi La Ti; MiFa Mi Ti LaLa La a

(#Rekantaĵe: dore do la somi do re; mifa mi Si mifa mi La; dore do la somi do re; mifa mi dolre mi mi i)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 /Plenan lunon sur ĉielo ; miris eta principidin' ; kaj ekĝemis amsopire: ; "Pala lun', mi amas vin!"

(×:; **Se vi venas vidalvide ; pasas plu mi tro rapide ; se vi venas vidalvide ; en la danca2 ĉeno.**)

'2 Plena luno sur ĉielo ; komprenante movis sin ; kaj reflustris la respondon: ; "Ankaŭ mi vin, principidin'!" .....

'3 Dum silenta rava nokto ; per eterna ĵura vort' ; pala lun' kaj principidino ; ligis sin al sama sort'. .....

'4 Kaj de tiu sorĉa nokto ; kun sufero dolĉa flam' ; brulis en la etaj koroj ; pro turmenta vana am'. .....

'5 Malespere plorĝemante ; kun sopiro en anim' ; konsumiĝis pro l' doloro ; plena lun' kaj principidin'... ..)